

Programo de KKPS

Ven	Ĉefsalono	Dua manĝejo / ekstere
15:00	Legado de Pos-Amiko	Alveno
18:00	Vespermanĝo	
19:30	Interkona vespero	
21:30	Trinkejo	Gufujo

Sab	Salono	Dua manĝejo / ekstere
8:30	Matenmanĝo	
10:00	Biciklotransporto en trajnoj	NEJ-membrokunsido
11:00	Scienca prelego de Frank	Ateliero pri Briĝo
12:00	Tagmanĝo	
13:00		Ekskurso
17:00	Halovena ornamado	
18:00	Vespermanĝo	
20:00	Halovena balo	
21:30	Diskejo	Gufujo

Dim	Salono	Dua manĝejo / ekstere
8:30	Matenmanĝo	
10:00	Cerbumado pri muzikaloj	
11:00		Internacia signolingvo
12:00	Tagmanĝo	
13:00	Venontaj renkontiĝoj	
14:00	Purigado	Purigado



Pos-Amiko

Aŭtuno 2022, numero 50

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. La lasta Pos-Amiko!
2. UEA rezignas pri ret-paĝo
3. Ĉiuj volas iri al KKPS
4. La famo de muzikalo
5. Kontakto rekaptas malfruiĝon
6. TEJO anstataŭigas oficistojn
7. Kara Koko
7. NEJ-Novaĵoj
7. Horoskopo
8. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

La lasta Pos-Amiko!

Kara leganto, ni atingis la finon. Jen en viaj manoj estas la lasta Pos-Amiko. La idealo de artisto estas ĉesi je pinto, kaj ja facilas argumenti, ke 2022 estas pinta jaro, kun amaso da Pos-Amikoj kaj amaso da vizitantoj al miaj renkontiĝoj.



Pos-Amiko

Somero 2012, Numero 1

INDEKSO:

- Trovitaj dokumentoj konfirmas: Lukiz volas iĝi diktatoro..... 1
- Scienco pravas ligan inter vodko kaj ebrieco.....2
- Pepo kaj Poso kaptitaj en korupta skandalo.....2
- La horoskopo.....2
- Marek Blahuš evidentiĝas roboto.....3
- Probal Dasgupta kabeas: "Mi konfuzis Esperanton kun hispana".....3
- EVENTOJ..... 4

Trovitaj dokumentoj konfirmas: Lukiz volas iĝi diktatoro.

En ŝoka revelacio pasintsemajne en la Verdejo, la somera palaco de Varsovia Vento-gurulo Irek B., estis trovitaj notoj kaj taglibro, kiu malkovras longdaŭrajn planojn de TEJO-perfidanto Łukasz Żubrowski kaj konspirantoj por kapti absolutan povon en TEJO. La sekvaj faktoj povas ŝoki la legantojn (sed pli verŝajne amuzos ilin).

La konspiro komenciĝis en 2010, kiam Gregor Hinker, la tiama perfidanto de TEJO, ne povis veni al estrarkunsido pro erupcio de Eyjafjallajökull. Nun montriĝas, ke Żubrowski erupciigis Eyjafjallajökull por forpeli Gregor el la kunsido kaj tiel subfosu lian pozicion. Ŝajne sukcese, ĉar en 2011 Lukiz fariĝis la 27-a perfidanto de TEJO. Indas rimarki, ke por ĉiu posteno estis ekzakte unu elektelebla kandidato.

En 2011 kaj 2012 Żubrowski forigis la restantajn kontraŭulojn el la oficoj de TEJO: la volontulon en decembro, la redaktoron de TEJO Tutmonde en januaro, la kaŝiston en aprilo kaj la ĝeneralan sekretulon en majo. Iliajn lokojn prenis proksimuloj de Żubrowski: Natalia, Paweł kaj Szabolcs, ĉiuj el Varsovio, kaj Przemysław el Bjalistoko, Polujo. La nun trovitaj dokumentoj montras

Kvalito ekde la unua numero!

Kaj pli kaj pli malfacilas teni la saman ĵurnalisman kvaliton en la artikoloj. En 2012 Pos-Amiko verkadis pri grandaj konspiroj kaj ŝokaj krimoj, kaj estis kvazaŭ unika tiel. Sed ankaŭ aliaj gazetoj

komencis imiti tiun ĉi realisman stilon, kaj la diferenco inter ajna novaĵfonto kaj Pos-Amiko jam preskaŭ malaperis.

Do jen la fino. Se vi volas plu ĝui, nepre aĉetu en via plej proksima libroservo mian libron.

REKLAMO

Nun en la libroservo de KKPS: **“Pos-Amiko: Dek jaroj da serioza ĵurnalismo de ambicia koko”**, kontraŭ nur 15 eŭroj!

UEA rezignas pri retpaĝo

Antaŭ longa tempo, en 2013, la komitato de UEA decidis rezervi grandan sumon el sia kapitalo, 100 000 eŭroj, por la kreado de nova retpaĝo. Tio ŝajnis tiam grandega sumo, kiun certe la asocio ne sukcesus ĝisfine elspezi.

Kaj kiom malfacile tio povus esti? Malmultaj tion povis imagi, ĉefe ne la diversaj estraroj de UEA, kies grandaj talentoj pri verkado de planoj kaj longaj retmesaĝoj ne lasis spacon por detala scio pri programado aŭ serviloj. Sed la dekmiloj da eŭroj ja restis en la movado, dividitaj inter diversaj esperantlingvaj programistoj, do ĉu vere oni parolu pri perdo? Jam tri estraroj sukcesis fini sian mandaton prokrastante kaj evitante finon de la projekto, sed iam finiĝas la poto da oro, kaj oni devas fakte prijuĝi la finitan produkton. La ŝovo de la tasko (kaj mono) al TEJO helpis eviti multajn demandojn de la komitato, sed malkiel UEA estraroj de TEJO ne volas resti ĉiam en sama stato sen progreso.

Pro tio la estraro de UEA nun faris la gravan decidon, ke la asocio ne plu havos retpaĝon. Ĝia gazetara komuniko diras: “Ni estis taskitaj pri renovigo de nia retejo, kaj laŭ ni la interreto estas nur modo, kies populareco iam denove falos. UEA do estu antaŭ la ondo, kaj la plej noveca tipo de retpaĝo estas neniue retpaĝo!”

Por klarigi la decidon la Pos-Amiko starigis demandojn al Fernando Maia Jr., la plej teĥnike kapabla UEA-estrarano:

P: “Ĉu asocio povas vivi sen retpaĝo?”

F: “UEA faris tion sukcese dum preskaŭ jarcento, nur eta parto de nia sukcesa historio estis kun retpaĝo, kaj ĝuste en tiu tempo la membronombro draste falis. Ni do revenu al pruvita vojo al sukceso.”

P: “Ĉu la malfacila kreado de nova retpaĝo kondukis al tiu ĉi decido?”

F: “Retpaĝo estas facila afero, sed programistoj malfacile komunikas. Ili ĉiam ĝenis nin pri malgravaj detaloj. Kial ni zorgu pri servilo, aŭ datumbazo, aŭ softvaro? En nia nuna retpaĝo mi ne vidas tiujn aferojn, do kial la nova bezonus tion?”

P: “Ĉu vi antaŭvidas kritikon pri la efektiva malŝparo de centmil eŭroj por nenio?”

F: “Por mi ne gravas, mi jam estis elektita Esperantisto de la Jaro pro laboro farita de aliaj, kiam E@I kreis tutan virtualan kongreson. Certe la Komitato plu subtenos min, ili ne scias pli bone, kaj ili ne legas la Pos-Amikon.”

Ĉiuj volas partopreni en KKPS

KKPS ĉiam estis sukcesa renkontiĝo, reprezentata fortan markon en merkato kun forta konkurenco de aliaj junularaj renkontiĝoj. Sed la deka KKPS, nun okazanta en Delft, iĝis pli granda sukceso ol iu ajn povis antaŭvidi. La organizantoj ja prepariĝis por la kutima entuziasmo, sed perfekta ŝtormo de ĉirkonstancoj multobligis la interesiĝon ĉi jare.

La apero de la lasta Pos-Amiko prezentas historian okazaĵon, kiun homoj ne volas maltrafi, kaj al tio aldoniĝas la jubileo, kaj tio en la historia gruploĝejo Kruithuis! Krome la tre sukcesa IJK en Nederlando montris al nova generacio de junaj esperantistoj la mirindan talenton de NEJ kaj la organizajn kapablojn de ĝia fama koko.



La viziulo Fernando



La vico por la akceptejo de KKPS

La rezulto estas mirinda: plenas ĉiuj litoj, en ĉiu havebla peco de grundo staras tendoj, la volontula domo de TEJO en najbara Roterdamo plenas kun KKPS-partoprenantoj, kaj oni eĉ aligas al hazardaj seminarioj por povi loĝi proksime de Delft en tiu ĉi semajnfino. La Eŭropa Unio eĉ aldonis unu horon al la semajnfino por povi organizi ĉiujn proponitajn programerojn!

Ĉiuj volas tuŝi la famon de muzikalo

La historio de la Esperanto-movado, almenaŭ de la junulara movado, ŝajnas nun esti dividita en du partoj: la epoko antaŭ June kaj kune, kaj la tempo post tiu ĉi spektaklo. Vivante en la unuaj tagoj de tiu ĉi nova epoko ni vidas ĉie ĉirkaŭ ni la ondojn elradiantajn de la sukceso.



Sufiĉas ne! Ni volas pli da muzikaloj.

La plej rekta efiko estas al la muzikalanoj mem, kiu de unu al alia tago iĝis steluloj en la movado. Antaŭe ili povis trankvile iradi al klubkunveno aŭ kongreso, sed nun ĉie ŝatantoj atendas por peti fotojn aŭ surskribojn. Ĉiu renkontiĝo en la kalendaro nun provas inviti ilin veni (aŭ se tio ne eblas, eĉ nur homojn, kiuj aspektas simile kiel ili).

Partoprenantoj senpacience atendas aperon de sekva muzikalo. Jam aliaj grandaj renkontiĝoj volas havi muzikalon pri si, same kiel June kaj kune temas pri IJK. Iuj klopodoj estas pli seriozaj ol aliaj: la Novjara Renkontiĝo konsideras simple renomi sian internacian ves-

peron 'muzikalo' pro tio, ke ĝi enhavas iujn kantojn kaj okazas sur scenejo.

La Internacia Scienca Asocio Esperantista intencas prezenti sian Sciencan Revuon en la formo de muzikalo, por ke finfine iu legu ĝin. La Civito jam anoncis 12-horan muzikalon pri granda batalo inter la fortoj de bono kontraŭ la malbonuloj de UEA, kun Giorgio Silfer kiel ĉefaktoro, kantanto, reĝisoro kaj verkisto.

La iniciatinto mem, Roĉjo, dume ricevadas de movadanoj tiom da ideoj kaj proponoj, ke eblus fari novan muzikalon ĉiujare almenaŭ ĝis la pretigo de la nova UEA-retpaĝo ĉirkaŭ 2040.

Kontakto rekaptas malfruigon

La jaro 2021 ne estis bona jaro por Kontakto. Foriris la longtempa redaktoro Rogener Pavinski, elektiĝis nova redaktoro Paweł Fischer-Kotowski, kaj Kontakto ĉesis aperi. Multaj kulpigas pri tio la novan redaktoron, sed la Pos-Amiko eksciis la veran kaŭzon!

La numeroj de 2021 fakte ĉiuj ĝustatempe pretis redakcie, sed misfunkciis la presilo de TEJO. Ĝi ricevis la dosierojn, sed paĝo kaptiĝis ene de la meĥaniko kaj blokadis la maŝinon. Kaj ĉar la presilo kaŝiĝis inter la multaj arĥivoj de TEJO kaj UEA, neniu rimarkis la problemon dum monatoj.

Finfine dum la ordigado de arĥivoj fare de TEJO-estrarano iu faligis libron sur la presilon, kiu montriĝis esti ĝuste la necesa bato por refunkciigi ĝin. Ekde tiam la presilo laboras senĉese por rekapti la malfruon.



La kulpa presilo

ANONCO

Volontuloj serĉataj por scienca esploro pri ligo inter frititaj manĝoj kaj malsato. Intere-siĝantoj anoncu sin ĉe Prof. O. Leo.

Asocioj anstataŭigas oficistojn per konkursoj

Ĝis antaŭ kelkaj semajnoj neniu aŭdis pri LEJL aŭ LEJO, sed nun ĉiuj en la junulara movado konas ilin. La surpriza sukceso de memea konkurso de la nova litova sekcio kunigis la energion de grupo de junuloj en malofte vidita maniero, kaj tio kontraŭ malklara promeso de 'ege litova premio'. Tiu sukceso ŝajnas imitinda, sed kiel imiti ĝin?

Unu el la plej rektaj sekvantoj de la ideo estas TEJO, kiu dum la somero perdis sian grafikiston. La tutmonda asocio konsideris dungi novan por krei siajn grafikaĵojn kaj varbkampanjojn, sed nun konstatas, ke memeoj kutime pli efikas kaj rapidas. Ekde nun antaŭ ĉiu kampanjo okazos memea konkurso por krei la necesajn varbmateriojn.

UEA pretiĝas por lanĉi ĉiumonatan konkurson por verki la plej bonan gazeteran komunikon, tiel ŝparante multe da laborforto, kaj la Civito simile volas anstataŭigi propran laboron per konkurso 'Mensogo de la semajno'. Kaj finfine E@I agas plej pionire, ili baldaŭ lanĉos konkurson por la plej bona ideo por nova konkurso.

Kara koko...

"Kial la Pos-Amiko malaperas? Kial vi ĉesas? Mia vivo ne plu havas sencon!"

Kara homo,

Ĉio en la vivo havas komencon kaj finon. Foje ni povas elekti ilin, foje ne. Ekzemple mi ne elektis, je kiu tago mi estis kudrita, sed mi ja elektis, kiam mi komencis verki la unuan Pos-Amikon.

Ekde tiam estis senĉesa sinsekvo da sukcesoj, homoj ŝatis ĉiun Pos-Amikon. Sed nenio povas daŭri senfine. Mi iĝas pli maljuna, miaj okuloj jam elfalas, do pli bone la fino estu nun, en la pinto de famo.

Por ke via vivo plu havu sencon, vi mem ekverku novan klaĝgazon. Ekde nun estas truo en la merkato!

Poso

NEJ- Novaĵoj!

Venu al la jara asembleo

Je sabato la 29-a de septembro ekde 09:30 okazos kiel tradicie la membroasembleo de la Nederlanda Esperanto-Junularo. Venu por decidi pri la estonteco de la asocio!

Atentu: ĉeesto de asembleo povas kaŭzi estraraniĝon. La Pos-Amiko ne respondecas pri eventualaj postsekvoj.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Manĝu multe da fromaĝo kaj siropvafloj, por iĝi nederlandano kaj iĝi NEJ-estrarano.

Taŭro: Vi gajnos la unuan premion en memea konkurso de la Akademio.

Ĝemeloj: Iu ĉarma fremdulo ofertas al vi tutnoktan ronkan koncerton.

Kankro: Se vi ne havas littukojn, kovru vin per malnovaj Pos-Amikoj.

Leono: Vi gravediĝos kaj Koko Poso estas la patro. Eĉ se vi estas viro. Ne demandu kiel.

Virgulino: Post dormado en tendo vi ne plu estos.

Pesilo: Vi ankoraŭ legas malnovajn Pos-Amikojn kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi iĝos respondeculo pri purigado de necesejoj dum Virtuala Kongreso.

Koko Poso: Vi baldaŭ estos elektita Koko de la jaro. Eble de vi mem. Ne gravas.

Sagitario: Vi aĉetos la malnovan retpaĝon de UEA duamane.

Kaprikorno: Vi malkovros, ke pli agrablas koramiko ol keramiko.

Akvisto: Se via tendo tro malvarmas, starigu ĝin ene de alia tendo.

Fiŝoj: Se vi verkas propran klaĉgazeton, ne forgesu fojfoje bati vian presilon.

HOROSKOPO POR LA RESTO DE VIA VIVO

Ŝafo: Vi havos dek infanojn kaj sendos ĉiujn al KKPS ĉiujare.

Taŭro: Vi iĝos fifama filmstelulo post via apero en sekva muzikalo.

Ĝemeloj: Post forta ŝtormo vi iĝos klimata rifuĝinto kaj vivos nur en Esperanto-kongresoj.

Kankro: Vi iĝos milionulo, sed pro inflacio tio ne multe helpas.

Leono: Kunportu ĉiutage ombrelon, kaj vi ĉiam havos batilon kontraŭ ĝenaj infanoj.

Virgulino: Vi perdos virgecon, sed ĉiam en la koro restos virgulino.

Pesilo: Vi ekhavas bonajn okulvitrojn kaj finfine legos ĉiujn frazojn.

Skorpio: Vi kreos vastan imperion kaj devigos ĉiujn viajn subulojn lerni dek lingvojn.

Aleks Kadar: Vi ĉiam restos fama pro via apero en la Pos-Amiko.

Sagitario: Vi aliĝos al pluramema komunumo kaj ĉiutage havos alian amanton.

Kaprikorno: Post du jaroj vi kreos sukcesan propran renkontiĝon kun propra klaĉgazeto.

Akvisto: Vi iĝos motiva parolanto, uzante la konsilojn el horoskopoj de Pos-Amiko.

Fiŝoj: Vi manĝos siropvaflojn ĉiutage kaj perdos ĉiujn dentojn antaŭ kvindeka naskiĝtago.